SALUTMESAĜO DE LA PREZIDANTO DE UEA

Karaj ukrainaj esperantistoj,

noma de la Estraro kaj Komitato de UEA, mi gratulas vin pro la okazigo de via 24-a kongreso. La lasta kvarona jarcento estis malfacila periodo por Ukrainio, kiel por multaj homoj tra la mondo. Estas ĝojinde, ke vi, same kiel samideanoj ĉiukontinente, daŭre pluportas la torĉon de la lingvo de espero kaj paco, eĉ en epoko kiam laŭtas la voĉoj de disdivido kaj milito.

Mi gratulas vin ankaŭ por via honorigo de la memoro de Vasilij Eroŝenko, rimarkinda homo, kies vivo kvazaŭ simbolas la kapablon de amo kaj klereco transponti la murojn inter la popoloj kaj la malhelpojn de individuaj cirkonstancoj. Li semis amikecon kaj komprenemon ĉie, kie li vojaĝis; ĉie, kie oni legis liajn poemojn. Nun, pli ol iam, tia semado estas kerna parto de nia misio kiel esperantistoj.

Mi esperas, ke via kongreso disvolviĝos ĝuoplene kaj fruktodone. Niaj pensoj estas kun vi.

Elkore,

D-ro Mark Fettes
Prezidanto
Universala Esperanto-Asocio